

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinaviaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaĵaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj 2³/₁₂.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 8 (44)

la 1:an de novembro 1899

IV:a jaro.

Rimarkoj pri la uzado de la vortoj

re, tuta kaj ĉiuj, sama kaj mem.

La prefikso *re* ludas tre grandan rolon en la latinidaj lingvoj, precipe en la franca. Ĝi havas triflankan signifon: 1) lokan, 2) tempan kaj 3) kontraŭdiran.

En Esperanto, kiel en aliaj lingvoj, la signifo de la vortoj ordinare eliras komence el la loka, konkreta. Tia estas la rilato de multaj el la prepozicioj, kiel ekz. *antaŭ, post, kontraŭ*.

La ideo de *re* estas ankaŭ unue la loka, konkreta. Se mi *iris* de la punkto A al la punkto B; oni diras, ke mi *reiras*, se mi faras la iron de B al A. La vojo estas la sama en ambaŭ okazoj, sed la enhavo de la faro estas kontraŭa. Mi *diras* el mia vidpunkto A prijuĝon al interparola persono, sed li el sia vidpunkto B diras kontraŭan prijuĝon: li *rediras* al mi. Mi *venas* al mia amiko; morgaŭ kaj ankaŭ postmorgaŭ mi *venas* denove, post ĉiu vizito mi *revenas* hejmen, sed iom post iom mi forgesas, el kiu punkto mi eliris, kaj pro tio mi intermiksas la venon kaj la revenon, kaj post tiam mi *revenas* al mia amiko kaj mi *revenas* al mia hejmo. Fine por mia penso restas nur la kompreno, ke la reveno estas farita *post* la veno; sekve mi parolas pri la reveno kiel ripetita veno. La komprenaĵo *re* tiel perdis sian kontraŭdiran signifon kaj nur la tempa senco restas. Sed tiu ĉi senco estas duavica, pro kiu mi ne devas forgesi la fundamentan signifon.

Tiel tamen faras ofte la francoj, ĉar ili uzas multe la prefikson *re* en pure tempa senco: ili *diras* hodiaŭ, kaj se ili morgaŭ ripetas tiun saman diron, ili nomas ĝin "*rediro*". Tio ĉi estas eraro. Ĉar se mi *refaras* verkon, mi ne faras en la dua fojo la saman kaj egalan verkon, sed mi neniigas la

unuon verkon per nova kaj alia. Se oni komencis legi libron kaj ĉesas kun la deka pago, oni ne rekomencas la legadon, se post la paŭzo oni legas plu komencante kun la dek-unua pago; tio ĉi estas daŭrigo. Sed se oni volas antaŭlegi la libron al aŭskultanto, kiu ne aŭdis la dek pagojn, oni rekomencas la legadon, kvazaŭ nuligante la unuan legon. Leginte erare oni *relegas*. A donas al B libron, kiun B *redonas* al li post la legado; B ricevas la libron kaj A *rericevas* ĝin.

El tiuj ĉi ekzemploj ni rimarkas, ke *re* havas ĉiam kune triopan signifon: lokan-tempan-kontraŭdiran, tamen unu el tiuj ĉi signifoj ofte estas superreganta kaj ŝovas la aliajn en la ombbron. Unu aŭ ambaŭ el ili ne devas tamen tute manki. Tio ĉi tamen okazas en tiela frazo kiel “ni reparolos pri ĝi, kiam . . .” (L’Espérantiste, p. 243), “reparolos” signifas tie “denove paroli, paroli ankoraŭ unufoje”.

* * *

La vortoj *tuta* kaj *ĉiuj* ofte estas uzataj de kelkaj personoj nekorekte. *Tuta* oni nomas aferon, kiun oni konsideras kiel mason, kiel unuon. Oni scias, ke la afero konsistas el multaj partoj, sed oni rigardas nur la *sumon* de tiuj ĉi partoj, el kiuj neniu mankas. *Ĉiuj* signifas ankaŭ sumon, sed nun oni rigardas la *partojn*, el kiuj konsistas la sumo, kiel unuojn. “*Tuta* afero” signifas unu solan aferon laŭ sia plena amplekso. “*Ĉiu* afero” signifas, ke la plena nombro da aferoj estas rigardata ne kiel sumo sole, sed la apartaj el ili estas aludataj unu kaj unu kiel memstaraj reprezentantoj. “La *tuta* homo” estas la plena figuro de unu aparta homo kun siaj membroj kaj ecoj. “La *tuta* homaro” estas la plennombro da homoj sen escepto rigardata kiel unuo. “*Ĉiu* homo” estas unu homo kiu ajn konsiderata kiel reprezentanto por la sumo da homoj. “*Ĉiuj* homoj” estas la sumo de la apartaj homoj komence de la unua ĝis la lasta: neniu estas nomita sed neniu estas forgesita. “*Tuta* tago” = plena tago; “*tutaj* tagoj” = plenaj tagoj; “*ĉiu* tago” = la apartaj tagoj, tiel la unua, kiel la dua kaj la tria, k. t. p. ĝis la lasta; “*ĉiuj* tagoj” = la sumo de la apartaj tagoj, la unua kaj la dua kaj la tria, k. t. p. sen escepto.

* * *

La vortoj *sama* kaj *mem* estas iafoje konfuze uzataj unu anstataŭ la alia.

Sama signifas, ke $A = B$; *mem* havas la signifon, ke $A = A$.

La vorto *sama* servas por kunigi du agantojn, aŭ du agojn en unu persono. Ekz.: *Sama* viro karesis la knabon kaj batis kruele sian ĉevalon; la “karesanto” kaj la “batanto” estas unu persono. La sinjoro, kiun vi renkontis hieraŭ en la ĝardeno, estas tiu *sama*, kiu nun parolas kun vi; la “renkontito” kaj la “kunparolanto” estas unu persono, ne du apartaj. La *sama* princo; ni vidas en la princo personon, kiu ne estas alia ol tiu princo, kiun ni rekonas de antaŭa okazo.

La vorto *mem* certigas, ke la persono aludita efektive estas tiu persono kaj neniu alia.

La princo *mem* rekompencis lin; tio ĉi signifas, ke la princo, efektive la princo kaj neniu alia plenumis la agon, la propra persono de la princo.

En tiu ĉi kunteksto ni povas ankaŭ montri, ke la vorto *eĉ* estas iafoje kunfuzata kun *mem*. *Eĉ* signifas “ne sole aliaj sed ankaŭ (se oni tion eble

ne atendis) precize la priparolata persono aŭ fakto“. *Eĉ* la princo rekom-
pencis lin; ne sole aliaj homoj, ŝed ankaŭ la princo, kvankam tio ĉi estis pli
malpli neatendita.

Paul Nylén.



Novaĵoj.

L'Espérantiste elsendis sian aŭgusta-septembran numeron kun riĉa kaj
interesa enhavo, nome: *Komentario pri la gramatiko de Esperanto* (en franca
lingvo kaj difinita por franclingvanoj), *La financa situacio de l'Espérantiste*
kaj *Kroniko* (ambaŭ en paralela franca kaj esperanta teksto). En la *Aldono*
sin trovas kelkaj verkaĵoj, legataj kun plezuro. Ili estas: *La Piemonta valo*
Pesio. (Clarence Bicknell.); *La konstruo de l' mondo laŭ la sanktaj libroj*
de l' lamanoj. (Tradukita el la lingvo rusa. — S. Polanskij.); *La Miozoto*.
(Tradukita el la lingvo portugala. — A. Caetano Coutinho.); *Legendo pri la*
Ĉieliro de Mario. (Tradukita de F.-X.-I. Solis, Ptro.); *La Kverko*, fabelo
de P. Gdeŝinski. (Tradukita el la lingvo rusa. — A. Kofman.)

* * *

Pri esperanto parolis. Pri la reapero de L. I. parolis kelkaj gazetoj. El tiuj,
kiuj venis sub niaj okuloj, ni nomas la sekvantajn, — krom *L'Espérantiste*, kies julia
n:o enhavas sufiĉe longan artikolon pri tio ĉi, finante per la diro ke “entute, ŝajnas
al ni ke la L. I. estas reorganizita en bonaj kondiĉoj”; kaj kies aŭgusta-septembra
n:o avizas pri la maniero de eldonado kaj abono de nia gazeto dum tiu ĉi jaro, kaj
la redakcio de *L'Espérantiste* proponas volonte sian helpon al francoj dezirantaj ĝin
aboni. *Hjulsport* (“radsperto”), eldonata en Stokholmo, parolas en n:o 27 sub la
rubriko “literaturo” pri la enhavo de la numero kiu aperis la lasta sub la malnovaj
kondiĉoj, kaj la n:o 39 sciigas sub sama rubriko pri la plioftiĝo de nia gazeto kaj
diras interalie: “Ĝis nun elvenis, post kiam tiu ĉi ŝanĝo estis farita, 5 numeroj, en-
havantaj en riĉa alternado verkaĵojn originalajn kaj tradukajn en versoj kaj prozo,
ĉio kun internacia intereseo kaj de verkintoj el diversaj landoj kaj mondpartoj.”
Plu tiu ĉi artikolo donas la sciigon, ke la vortaro sveda-esperanta estas en presado.

La Plume Sténographique (eldonata de s-ro F. Canet, en Limoges, Francujo) ne
preterlasas anonci pri Esperanto en ĉiu numero. En la septembra n:ro ni legas:
“Jen bona novaĵo, kiu kaŭzos, ni ne dubas pri tio, plezuron al ĉiuj niaj amikoj, kiuj
konas kaj praktikas Esperanton: La Lingvo Internacia, kiu ĉesis publikiĝi, ĵus komencis
denove aperadi sub la direktado de nia estimata kolego kaj amiko s-ro Paul Nylén
en Upsala, Svedujo. Ni tre gratulas lin pro lia bonfara decido kaj ni aldeziras al li
ĉian sukceson dezireblan. La esperantistaro eĉ gajnis dank' al tiu malapero iom-
tempa, ĉar L'Espérantiste, kiun direktadas tiel lerte nia bona amiko s-ro de Beaufront,
daŭrigos la eldonadon de la “Aldono” en Esperanto, kiun li fondis en la komenco de
tiu ĉi jaro por anstataŭi la L. In.” — La oktobra numero de tiu sama gazeto donas
al ni tre bonajn sciigojn en la artikolo pri Esperanto, kiu komencas per tiuj ĉi vortoj:
“Ni vidas kun plezuro, ke nia mirinda lingvo internacia akiras ĉiutage plivastiĝon
kaj ke, estante nur konata, ĝi estas pli kaj pli ŝatata.” Post la konigo, ke nova
kurso estas fondita ĉe *L'Union française de la Jeunesse*, en Lille, de s-ro E. Louvet
el Bernos-Lille, la artikolo daŭrigas: “Niaj legantoj scias, ke jam ekzistas kursoj en
Bruselo, Grenoble, Limoges k. c.; ili povas juĝi laŭ tio ĉi pri la indo de Esperanto,
ĉar estas certe, ke tiu ĉi lingvo estus senkompate forlasita flanken de tiuj mem, kiuj
ĝin enskribas en la programon de siaj kursoj, se ĝia konado kaj ĝia praktikado ne
donus neŝateblajn servojn.”

Antaŭ ĉirkaŭe du monatoj — la ĉiutaga gazeto “*Morgenbladet*”, eldonata en la
ĉefurbo de Norvegujo, Kristiania, enhavis artikoleton, portantan la rubrikon “*Espe-*
ranto. Universalsprog” (sprog = lingvo). D-ro Asklöf, kiu vizitis Norvegujon dum la
somero, sendis al ni la detranĉaĵon (li forgesis citi la numeron). Tiu ĉi noto rakontas,
ke la redakcio de *Morgenbladet* ricevis el Peterburgo poŝtkarton, kiu estas presita
laŭ la originalo, sed kun multaj preseraroj. Ĝi estas skribita de s-ro A. K. Burenkov,


kiu deziras senpage komuniki al la redakcio, por presi en ĝia gazeto, novaĵojn el sia urbo kaj lando, skribitajn en Esperanto por propagando de tiu ĉi lingvo. La redakcio de *Morgenbladet* sendis la poŝtkarton al profesoro Joh. Storm, kiu eldiris, ke Esperanto laŭ lia opinio havas tiel malmulte da intereso kaj estonteco kiel la aliaj artaj lingvoj universalsaj, "volapük" k. c. —

La redaktoro de L. I., ricevinte tiun ĉi artikoleon de la norvega gazeto, skribis tuj al profesoro Joh. Storm klarigante la celon de Esperanto kaj sendis al li samtempe la literaturon necesan por konatigi lin kun nia lingvo. La profesoro respondis dankante por la verkoj senditaj kaj aldonis, ke al li estis neeble aliri ian pli detalan preparoladon pri la afero; li povis nur observigi, ke li ĉiam agadis por la *efektivaj* lingvoj kaj neniam kredis je la *artaj*.

Nia estimata esperantista amiko E. Steckel en Doylestown (Penns. U. S. A.) transsendis al ni unu numeron de la gazeto "*New York Journal*", kiu enhavas tre favoran artikolon pri Esperanto sub la rubriko "*A New Language Everybody Can Speak the World Over*" (nova lingvo kiun ĉiu povas paroli ĉie en la tuta mondo). La artikolo komencas jen: "Parizo, sept. 1:a. — La Internacia Ekspozicio de la jaro 1900 donos oportunon por estigi multajn kongresojn. Sed nenia estos pli novspeca kaj interesa ol la kongreso por preparolado pri universala lingvo. Instruitulaj homoj jam estas en laborado por la proponita kolektigo de lingvistoj. Neniam post la Lingva Konfuzo tiom da lingvoj estis reprezentataj en unu loko, kiom estos ĉe tiu kongreso, kiu preparolos la pretendojn de la nova lingvo nomata Esperanto."

Post tio sekvas informoj pri la historio, konsisto kaj celo de Esperanto, kaj du leteroj al la redakcio de *New York Journal*, unu de profesoro Ernest Naville en Genevo, la alia de profesoro George Picot, konstanta sekretario de la Akademio por moralaj kaj politikaj sciencoj en Parizo. Ambaŭ leteroj montras tre konvinkige la bezonon de internacia lingvo kaj la taŭgecon de Esperanto por plenumi tian bezonon.

Se nia ideo nur akiris al si firman fundon en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, tiam la progreso de nia afero faris grandan marŝon antaŭen al la atingo de sia celo. En bona horo!



"L'Union postale" ekestas 25-jara.

La Ligo Poŝta Universala kaj la paco.

La 9-an de oktobro 1874 fariĝis en Bern inter ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo, la Unuigitaj ŝtatoj de Nord-Ameriko kaj Egiptujo la komuna poŝta kontrakto, kiu fariĝis la fundamento de la ligo poŝta universala. La paŝo estis bone antaŭpreparita. Nur dudek kvin tagoj da traktado estis bezonaj por la efektivigo de tiu ĉi ampleksa "unuigo", kiu restas sola en sia speco kaj sen antaŭirantoj en la tutmonda historio.

En la komenco oni havis grandajn dubojn pri tio, ke *l'union postale* povus kunteniĝi kaj sukcesi por la estonteco. Sed tiuj duboj iom post iom kaj nuntempe plene estas forigitaj, dum la efektivo vaste superis eĉ la plej kuraĝajn esperojn. Se oni volus nun elkaluli ĉiujn landojn, kiuj aliĝis al la ligo poŝta universala, tio estus longa nomaro. Kontraŭe estas facile kalkulataj tiuj landoj, kiuj ankoraŭ ne eniris la ligon. Ili apartenas al du grupoj, el kiuj unu ampleksas diversajn landojn kun *propra* ordigita poŝto, nome: Beĉuanalando, la Britanaj posedoj en la delto de Niger, la Britana Centr-Afriko, Ĥinujo, Rhodesio kaj diversaj insuloj kaj insulaj grupoj en Aŭstralio, kaj la dua grupo, siaflanke, ampleksas la sekvantajn landojn, kiuj senestas propran ordigitan poŝton: Abisinujo, Afganistanujo, Arabujo, Beluĝistanujo, Ladakh (Malgranda Tibetujo), Koreujo, Marokujo kaj la insularo Samoa. Ĉe tio tamen estas rimarkinde, unuaparte ke Ĥinujo kaj Koreujo ĉe la universala poŝta kongreso en Washington (Ŭoŝingtn) 1897 ekkonigis sian intencon aliĝi al la ligo poŝta universala, aliaparte ke al tiu ĉi ligo jam apartenas ne sole la britanaj, francaj, japanaj, portugalaĵ, rusaj kaj germanaj posedaĵoj kaj

poŝtejoj en Ĥinujo, sed ankaŭ la japanaj poŝtejoj en Koreujo, kiel ankaŭ la britanaj, francaj kaj hispanaj posedaĵoj kaj poŝtejoj en Marokujo kaj, fine, Apia sur la insularo Samoa.

La ĉefa merito pri la fondo de la ligo poŝta universala apartenas al la mortinta antaŭ du jaroj d-ro von Stephan, ĉef-poŝtestro en Germanujo. Liaj eminentaj ecoj personaj, lia granda talento de politikisto kaj vastegaj scioj venkis kaj pacigis la interkontraŭajn interesojn ĉe la multaj landoj partoprenantaj en la Berna kongreso kaj forigis la malhelpaĵojn ĉiuspecajn, speciale financajn, kiuj baris la vojon.

Tiuj poŝtaj administradoj, kiuj ĉefe peris la interŝanĝon de la letera poŝto inter aliaj landoj, aŭ kiuj, en sekvo de la granda etendeco de siaj poŝtaj distriktoj, ĝis tiam enspezis laŭkontrakte pli grandajn partojn el la poŝtpago, devis nome dank' al la konsento de unu el la ĉefprincipoj de la nova propono, — la rimarkinda plimalgrandigo de la tranzitaj pagoj kaj ilia konforma divido inter ĉiuj landoj partoprenantaj en unu sama poŝta interŝanĝo, — submeti sin al duobla malprofito, dum aliaj poŝtaj administradoj povis sen konformaj oferoj ĝui ĉiujn profitojn de la nova liga kontrakto. Estis nature nenia facila problemo konsentigi la koncernatajn pri la supre aluditaj permesoj, kiujn postulis la intereso komuna.


* * *

L'union postale tamen montris sin esti io pli ol progreso komunika. Ĝi fariĝadis unu potenca movilo por la sento de unuanimeco inter la popoloj kaj per tio por la tutmonda paco. Pli ol unu fojon tiu penso estis elparolita. Tiel, por ekzemplo, estis dirita en la dua kunveno, la 29-an de majo 1897, dum la universala poŝta kongreso en Washington de unu el la deputatoj de Grand-Britanujo, la sekretario en la angla poŝtĉefejo Spencer Walpole, kaŭze de la konigata aliĝo de Koreujo kaj Ĥinujo: “Nia faro estas faro de la paco, kaj la aliĝo de Ĥinujo kaj Koreujo al nia ligo havas la sencon — mi permesas al mi tion esperi — doni garantion por la tutmonda paco“, eldiro, kiu estis akceptata kun viva aplaŭdo. Kaj unu el la du germanaj deputatoj, la direktoro en la poŝta departemento de la germana regno Fritsch envoĉis en tio ĉi kaj aldonis ŝerce: “La ligo poŝta universala nun almilitis la Ĉielan regnon; por ke la feliĉo de la ligo estu efektive eterna, mankas nur la floro *oranĝa*; mi estas konvinkita, ke ĉiuj miaj kolegoj sin unuigos kun mi elparolante la deziron, ke ni gajnu ankaŭ la aliĝon de la liberŝtato *Oranĝa*.“ Respondante al tio ĉi sciigis la prezidanto, la ĉefpoŝtestro de la Unuigitaj ŝtatoj George S. Batcheller, ke li havis la feliĉan okazon povi doni al la kongreso tiun oranĝon, kiu mankis por ke ĝia feliĉo estu perfekta. Li antaŭlegis tiam telegramon pri tia aliĝo de d-ro Henriko Muller, kiu estis sendita pri speciala misio de la liberŝtato Oranĝa al Berlino.

* * *

Por la festigo de la 25-jara ekzistado de la ligo poŝta universala la registaro de la Svisuja konfederacio elsendis inviton al ĉiuj registaroj partoprenantaj en la ligo, ke ili sendu reprezentantojn al konferenco en Berlino, kies kunveno tamen pro specialaj kaŭzoj estas difinita por la 2:a de julio 1900.

El la sveda gazeto *Dagens Nyheter*
tradukis Paul Nylén.



La knabino vilaĝana.

(El la glora poeto *J. L. Runeberg.*)

La sun' subiris, la vesper' somera venis bela,
Ruĝiĝis la pejzaĝo per purpura lum' ĉiela,
Da vilaĝanoj venis ar' el la penad' de l' tag'
Por en la hejm' ripozi nun post elfinita ag'.

Farita estis nun ofic', rikolto defalĉita, —
Sovaĝa, malamika ar' nun kuŝis elvenkita,
En la maten' al la batal' la viroj iris for,
Post venk' ilia estis nun jam la vespera hor'.

Proksime al la kampo de l' batal' en tiu fojo
Dezerta preskaŭ staris jen dometo ĉe la vojo,
Knabin' sur doma la ŝtupar' sin trovis, en silent'
Ŝi vidis ilin pasi for momenton post moment'.

Serĉante kvazaŭ vidis ŝi, kaj ŝur la vang' sin trovis
Kolor' pri hela ol la ruĝ' ĉiela doni povis, —
Silenta, varma sidis ŝi en tiom da esplor',
Ke povis ŝi aŭskulti eĉ la batojn de la kor'.

Kaj la knabin' rigardis nur je ara la foriro,
Demandon donis per l' okul' ŝi eĉ al ĉiu vivo,
Demandon malkuraĝan kaj timeman donis ŝi,
Silenta pli ol la ekĝem' de l' brusto estis ĝi.

Sed kiam forpasinta de l' komenco ĝis la fino
La aro estis, iris for la forto de l' knabino, —
Ne laŭte ŝi ekploris, sed ekkaŝis per la man'
Ŝi la vizaĝon, kiun nun eklavis larma ban'.

“Pro kio plori, ho, filin', esper' ankoraŭ restas,
Aŭskultu do je la patrin', plorado vana estas;
Ho, tiu, kiun vane ĵus serĉadis la okul',
Je vi pensinte restas li ankoraŭ nun vivul'.

Konsilon mian blinde ne marŝadi al la morto
Li sekvis, estis ĉe l' disiĝ' jen mia lasta vorto,
Nur devigite sekvis li la rotojn sur la voj', —
Ne volis morti li de ni kaj de la viva ĝoj'!”

Ĝkvidis supren la knabin', el revoj elvekita,
La sentan staton de la kor' ekrompis pens' subita,
Ŝi vidis al la loko de l' batalo dum moment',
Leviĝis de l' ŝtuparo kaj foriris en silent'.

Kaj temp' post tempo fluis for, la nokt' alproksimiĝis.
Arĝente brilis la nubar', sed l' ombroj plidensiĝis. —
“Ho, venu do, filin', en van' nun maltrankvilas vi,
Fianĉo via estos jam matene tie-ĉi!”


Silente venis la filin' jen al patrino sia,
La larmaj gutoj brilis plu ne en okulo ŝia,
Sed ŝia man' donita al saluto estis nun
Malvarma, ŝia vango pli palega al la lun'.

“Pretigu tombon nun al mi, l' esper' de l' vivo dronis,
Forkuris li, al kiu mi amegon mian donis,
Kun hont' el la batal', pri mi, pri si pensinte nur
Patrujon, fratojn trompis li per honta la forkur'!”

Ĉe l' ven' de l' ar' mi ploris ĵus je lia bela sorto
Kredinte kiel viron lin batitan per la morto,
Ho, granda estis la dolor', sed dolĉa estis ĝi,
Por lin funebri en etern' vivadi volis mi.

Ĝis lum' la lasta de la tag', patrin', mi serĉis ĉie
Lin inter la mortuloj, sed mi trovis lin nenie,
Nun sur la ter' trompeca plu ne vivi volas mi,
Mi volas morti, ĉar sur l' kamp' ne kuŝis morta li!"

Tradukis **Sigurd Agrell.**




Al la stelo de l' espero.

Sur nokta la ĉielo	Se nuboj eĉ forkaŝos
Por homa la okulo	Vin iam por l' okulo
Radias vi, la stelo de l' espero!	Ne plendos ni pro tio, ĉar ni scios,
Antaŭen al la celo	Ke baldaŭ vi elpaŝos
Kondukas via brulo	El nigro kaj nebulo
Nin gaje tra la nokto de la tero.	Kaj ke pli bele ree vi radios. —
Je vi en la mizero	Ni ĉiam opinios,
Nur sole ni konfidas,	Ke estas stel' matena
Vi nin konsolas,	Vi, kiu diras,
Kaj ni forgesi volas	Ke post vi sun' eliros
Dolorojn niajn, kiam vin ni vidas.	Pli bela kun la luma tag' solena!

Ho, stelo de l' espero,
Lumadu al la celo,
Ne nokt' fariĝos tiam en la koro!
Al homoj de la tero
En via sankta helo
Ne vana ŝajnos esti la laboro.
En ĝojo kaj doloro
Ni ĉion, ja, oferos
Por sankta ago
Kaj ĝis fariĝos tago
Ĉe via lum' batalos kaj esperos!

Sigurd Agrell.




Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi kun personoj, kolektantaj poŝtsignojn kaj poŝtkartojn ilustritajn. Havas grandan aron da poŝtkartoj kaj poŝtsignoj por interŝanĝado. Respondas ĉiun leteron esperantistan. Adreso: St. *Ŝestilino*, Rybinsko-Bologovskoj ŝel. dorogi. *Selo Vereteja*. Gubernio de Jaroslavl. Rusujo. S-ro I. G. Ŝirjaev.

La Ligo de Gastamo. S-ro I. G. *Ŝirjaev* plezurege donas al ĉiu abonanto de "L. I." loĝejon, nutraĵon k. c. dum *monatoj someraj*. Ĉiu volanta min viziti ricevos informojn kaj ĉevalon de l' fervoja stacio. Adreso: St. *Ŝestilino*, Rybinsko-Bologovskoj ŝel. dorogi. *Selo Vereteja*. Rusujo.

Sciigo de la redakcio. Ĉar ni aŭdis, ke precipe rusaj abonantoj de tiu ĉi jaro dubas pri la transsendo de abona pago pro tio, ke ili ne havas permeson sendi monajn leterojn al la Ekspedejo, sed devas adresi al nomita persono, ni petas ilin adresi tiajn leterojn al s-ro Hjalmar Bäckström, Aktiebolaget Bodträskfors Luleå-kontor (la kontoro de la akcia societo Bodträskfors), *Luleå*, Svedujo.



Rebusoj.

Solvoj.

N:o 36, I: *Granda kaj kara surprizo* (granda *K* a'j *k*-ar' *A* sur *pri z*). Neniu solvis.

N:o 36, II: *e, i, o*. Solvis s-ro F. Chauffoureaux en Forest, Belgujo.

N:o 36, III: *Zamenhof* (zinko, . . . , flui). Solvis s-ro F. Chaufoureaux; s-ro I. Moskovčenko en Raŝni-Lesovije, Rusujo.

N:o 40, I:

*“Diru mia bel-angelo,
Diru, ĉu ne estas vi
Dolĉa revo, sonĝo bela
De poeta fantazi?”*

*Ne, ho ne, ĉar en vi ĉio:
La okuloj kaj buŝet’,
Estas super fantazio,
Super kreo de poet’.*

Tradukis Kofman.”

Solvis: s-ro F. Chaufoureaux; s-ro Jos. Jamin, Bruselo, Belgujo; Sam, en La Rochelle, Francujo; s-ro L. de Makay en Lócse, Hungarujo; d-ro K. Ŝidlovskij, en Moskvo, Rusujo; fr-ino H. C. en Öferselö, Svedujo; s-ro Fr. Ender en Wilczkóv, Polujo; fr-ino Vera Maŝuviĉ, Vilna Rusujo.

N:o 40, II: *Tempo* — *mono*; *pomo*. Solvis: d-ro Ŝidlovskij; s-ro Chaufoureaux; s-ro Ender; fr-ino H. C.; Sam; s-ro Jos. Jamin; fr-ino Vera Maŝuviĉ.

Anagramo

de D-ro K. Ŝidlovskij.

Aranĝu el kvar literoj du substantivojn. Kunmetinte la duan silabon de l' unua vorto kun la unua silabo de l' dua vorto, oni ricevos trian vorton, signifantan tutmondan ilon. Tion saman oni ricevos, se ĉe la dua vorto oni reciproke ŝanĝos la silabojn, alie: la duan silabon oni starigos anstataŭ la unua kaj la unuan anstataŭ la dua. Krom tio, kuniginte la unuan silabon de la unua vorto kaj la duan silabon de la dua vorto, oni havos ree la unuan vorton; kuniginte do la unuan silabon de la dua vorto kaj la duan silabon de la unua vorto oni havos la duan vorton.

ANONCOJ.

Mi havas la honoron sciigi amikojn esperantistojn, ke mi akceptas mendojn de la plej diversaj specoj da presaĵo en la lingvo Esperanto por presejo esperantista en Hungarujo. Tiu ĉi presejo plenumas ĉiujn mendojn de esperantistoj dum mallonga tempo kaj prenas la plej malgrandan pagon. Ĝi rekomendas al Vi vizitkartojn (kun la transsendo per pakajo rekomendita — 90 kop. por cento), leterpapirojn, kovertojn, poŝtkartojn, librojn, anoncojn kaj cet. Mi sendas al ĉiu volante la detalan anoncon en Esperanto post la ricevo de poŝtsigno en 3 kop. Por la respondo volu almeti poŝtsignon.

Mia adreso: Rusujo. St. *Ŝestihino*, Rybinsko-Bologovskoj ŝel. dorogi. Selo *Vereteja*. al **Ivan Ŝirjaev**.

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉeteblaj:

La **literaturisto kaj lia fianĉino**. Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis **Otto W. Zeidlitz**. Kostas 65 centimojn.

Du **Mirrakontoj** de **Otto W. Zeidlitz**. Kostas 40 centimojn.

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la **Societo “Espero” en S. Peterburgo**. Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la **Klubo Esper. Upsala**, kiel ankaŭ ĉe D-ro **Zamenhof**.

La kumiso-eksport'

neniam difektigas. Oni povas ĝin ricevadi dum la tuta jaro. Broŝuro (en rusa lingvo) oni ricevas senpage Adreso: St. **Smyŝ-ljaevka** Samaro-Zlatoust. ŝel. dor. Al s-ro **B. Postnikov**.

A. Caetano Coutinho

en **Sete Lagoas, Minas Geraes, Brazil**, deziras akiri la librojn N:o 11, 25, 46, 51 kaj 111, por mono, eĉ preter ilia kosto.